Universala Esperanto-Asocio

FAKOJ, KURSOJ KAJ PROJEKTOJ

Estrara Subteamo: MOVADO

EKO 2016-4 sendita el Budapeŝto la 12an de februaro.

Al: Landaj kaj Fakaj Asocioj de UEA (aliĝintaj kaj ne). Plie al la Komitato, Konsilianoj, regionaj komisionoj de UEA, ILEI-aktivuloj, TEJO-estraro, la E-gazetaro kaj radiostacioj, listoj kaj unuopuloj (petu senpagan ricevon!).

Por tuja uzo kaj plia diskonigo.

# Resumo el 2014 pri la Fakaj Asocioj

UEA liveris al vi la resuman raporton de Landaj Asocioj pri 2014. Tio okazis per alkroĉaĵo al la komuniko EKO 2016-2 sendita en la 28a de januaro. Du semajnojn poste, pretas la analoga raporto pri la Fakaj Asocioj de UEA. La enketilo disiris al ĉiu FA lisitgita en la Jarlibro – 61 entute, el kiuj ni rimarkis nur 14 respondojn. Tamen, tio donas utilan komencon al la deziro koni pli detale la agadojn de la fakaj asocioj, precipe tiuj ligitaj al UEA. El tiuj datumoj ni faris bazajn analizojn, sed eblus fari multon pli.

Ni planas pretigi enketilon pri la agadoj de LA kaj FA en 2015 – sed tio estos starigita per enketilo plenskribebla komputile. Tia reteja solvo pli efikos ol la pezaj meĥanismoj uzitaj por 2014.  Tiel la bazaj datumoj povos esti aŭtomate kompilitaj resumoj, tiel ke homfortoj necesos nur por pli profundaj analizoj.

Ni kore dankas al tiuj Asocioj, kiuj ja reagis pri 2014. Ni vokas al nerespondintoj atenti nian informon pri la starigo de la reta enketilo pri 2015, tiel ke la reago-proporcio estu pli kuraĝiga.

## Kurso en Tajlanda Universitato kun disdono de diplomoj



Okazis la unua Esperanto-kurso en Tajlando, kiun Warut Bunprasert preparis per la tajlingva Esperanto-lernolibro de Stano Marĉek. Raportas d-ro Gabor Markus: “Nia Esperanto kurso en la Srinakharinwirot Universitato estis sukcesa. Warut ricevis supermezgradan atestilon, kiu per ĝi celas sukcesan profesian karieron pere de Esperanto. Dua studento ricevis atestilon pri la sukcesa fino de la enkonduka Esperanto-kurso, ĉar ŝi bone faris ĉiujn hejmtaskojn. Aliaj studentoj komencis fari la hejmtaskojn tre sukcese, do ankaŭ ili ricevos la unuan atestilon dum la venontaj semajnoj.  Mi uzas

la libron de Stano Marĉek kaj samtempe ankaŭ miajn librojn (ekzercarojn), kiujn mi jam sukcese uzis en koreaj universitatoj kaj kiujn vi trovas jene:"

http://esperantofre.com/mondo/mglegu.htm

"La studentoj en la universitato ne emas studi studobjektojn se ili ne vidas, ke tio estas utila por ili. Ili bezonas diplomojn, aŭ atestilojn." Tiuj estis rapide kreitaj, en kunlaboro kun UEA. Kun la atestiloj estis aldonita dokumento kun la rezolucio de Unesko el 1954. D-ro Markus denove: "Se tiu projekto estos sukcesa, restos ŝanco, ke mi gvidu similan kurson en Laoso. Estro de anglalingva lernejo en Vientiane jam proponis tion al mi."

## E-FORCEJO: Orfa Baz-lernejo NJIWA

Jen resumo de la E-laboroj en Rutshuru, urbo en la nordorienta parto de Kongo DR. Raportas Joel Muhire: "Ni kreis en 2009 klubon, Verda Stelano-Klubo (V.S.K). En 2012 Esperanto havis duonhoran spacon en la loka radio *Racou FM*, tamen tio daŭris nur du monatojn pro akraj sekurecaj malordoj. Mi fuĝis al Ugando. Reveninte hejmlanden en januaro 2014, mi daŭrigis mian propagandeman laboron, rezulte de kio mi sukcesis persvadi la estron de la radio *Alliance FM*, s-ron John Koraho, pri la neceso ekinstrui Esperanton per sia radio. La kurso duonhora de tiam ĝis nun okazas regule ĉiun mardon kunlabore kun VSK kaj tiel ni atingas grandan publikon.

En Aprilo samjare, mi vizitis la Pastoron Ngango Muhima kune kun s-ro Honoré Sebuhoro petcele enkonduki Esperanton en sian elementan orfan lernejon Njiwa. Li favore aprobis. Li komprenis ke valoras tiu lingvo neniesgenta, amikiga kaj taŭga ilo por forneniigo de lingva diskriminacio kaj tribismo nocantaj la nunan socian tavolon, kaj ke ĝi kontribuas al la paco-konstruado en la mondo. Ni decidis apartigi la lernantojn laŭ leg- kaj skrib-kapabloj. S-ro Obed Niyonchutu helpas ĝardenisti la baznivelajn lernantojn kaj Joel Muhire la ceterajn. Dum la ĉiusemajna radio-emisiado, mi invitas du aŭ tri lernantojn por poem-deklami aŭ kanti. Post hezita komenco, la lernantoj ekŝategas Esperanton tiel ke ili petas lerni plu, eĉ libertempe. Nia orfa lernejo Njiwa bezonas lern-instigajn esperantaĵojn por lega ekzercado, flagon, komputilon, fotilon k.s. Se vi iumaniere pretas subteni nin, ni antaŭdankas.

Ni tiel kune akvumu la jam semitajn semojn en tiu E-forcejo por plena kresko."

**Retadreso:** joelmuhire0@gmail.com ; **UEA-konto:** jmhr-a; PO BOX 08 UG, Bunagana-Kisoro, UGANDO



## Raporto pri la interlingvistika sesio en UAM

Milda februara vetero akceptis la persistajn partoprenantojn de 4a interlingvistika sesio en la poznana universitato. Ne nur komence, en septembro 2014 la grupo estis rekorda, sed ankaŭ nun ĝi estas tia: 17 studentoj (5 el Brazilo, po 3 el Hispanio kaj Pollando kaj po unu el Belgio, Ĉeĥio, Kroatio, Rusio, Serbio kaj Svedio) progresas en siaj studoj pri interlingvistiko kaj esperantologio.

Ĉi-jare d-ro Ulrich Lins, aŭtoro de *La danĝera lingvo,* prezentis la movadhistorion de Zamenhof ĝis post la dua mondmilito kun multaj interesaĵoj. La aliajn tri kursojn gvidis prof. d-rino Ilona Koutny envolvante la gestudentojn en diskutojn kaj ludojn. Kadre de aplikata lingvistiko temis pri leksikografio, lingva planado, multlingvismo kaj denaskismo ĝis pri komputa lingvistiko. Kontribuis ankaŭ d-ro Marc Bavant pri terminologio kaj prof. d-ro Zbigniew Galor pri lingvo kaj socio.

La tria semestro de esperanta gramatiko prilumis la riĉecon de la Esperanta leksiko inklude frazeologiaĵojn kaj vortfaradon. Oni traktis lingvotavolojn, skizis la evoluon de Esperanto kaj ĝia loko laŭ lingvotipologio, kaj esploris kutimojn de lingvouzo (alparoloj, petoj kaj aliaj ĝentilecformoj) serĉante normojn kaj limojn de komunaj scioj kaj eblaj supozoj en internacia parolkomunumo.



Post la sesio, sabate okazis ekskurso al Vroclavo, kiu estas ĉi-jare *eŭropa kultura ĉefurbo* kaj gastigos la junularan Kongreson IJK. Lokaj esperantistoj kaj partoprenantoj de la universitato de la tria aĝo akceptis kore la grupon.

Sendis: Ilona Koutny.

==========================

Restas por sekva EKO-komuniko interesa ekzerco-rezulto ĵus pretigita el materialoj de la AMO-seminario 15 okazinta pasintoktobre en la kulturcentro Greziljono.

Vortoj: 965

Ĉi tiu komuniko estas disponebla laŭ la permesilo Krea Komunaĵo Atribuite Samkondiĉe 4.0 Tutmonde.
Por pli da informoj vidu ĉe: <https://creativecommons.org/licenses/by-sa/4.0/>.

Por vidi pli malnovajn komunikojn iru al: www.uea.org/vikio/Komunikado_kun_LA,_FA...

PDF kreita de Nuance Power PDF